

P-602233
klant 251606



Esperanto 3000

Driemaandelijks tijdschrift

Juli-december 2022

V.U. Ivo Schenkel, Karekietenlaan 14, 3010 Kessel-Lo

jr. 43 nr. 3&4 (la lasta)

Trimonata revuo

julio-decembro 2022

Afgifte: 3000 Leuven 1

lit nummer:

De la redakcio

Voorwoord van de voorzitter

Nia revuo Esperanto 3000

Komunikado en la estonto

Ĉu Esperantujo kreskas aŭ
malkreskas?

Notu jam en via agendo

***Jen la lasta numero de la informletero de Esperanto 3000.
Ekde nun detale legu ankaŭ nin en Horizon-Taal
kaj en nia retejo esperanto3000.be***

Ni dankas vin pro via membreco ankaŭ en 2023!

ESPERANTO 3000

Revuo de Esperanto 3000 vzw Leuven,
asocio por LEUVEN kaj ĉirkaŭaĵo
Aperas 4-foje en la jaro, jen lasta numero.

www.esperanto3000.be

Kontaktadreso / Contactadressen

info@esperanto3000.be

Albert Stainierstraat 1, 3001 Heverlee
Myriam Van der Steen, Albert Stainierstraat
1, 3001 Heverlee, mvdsteen@skynet.be
(aldoniĝos la aliaj novaj estraranoj)
Martin Decaluwe (eksa prez.) 016 25 96 12,
decaluwemartin@gmail.com

Membreco / Lidmaatschap E. 3000

membro/lid Eo3000 + FEL = €30 =
Horizon-taal + lid FLEJA (ĝis 29-jara)
(€25 kun nurreta HorizonTaal)
familia membreco = €55 (€50 se nurrete)
Idem/same + Monato = €92

Membreco / Lidmaatschap UEA (2023)

Membro/lid UEA + jarlibro = €44
Same/idem + Esperanto €74

Membreco / Lidmaatschap aliaj (2023)

ILEI + Int. Pedagogia R. = €27 (eo)
TEVA + Esperantista vegetarano = €20

Abonoj / Abonnementen (2023)

Horizon-taal = €30 (nl/eo) nurrete €25,-
(senpaga por gemembroj)

Monato = €65, por ĉiuj (eo)
(€62 se kun FEL-membreco)

Ret-Monato = €36,40, por ĉiuj (eo)

Esperanto (UEA) = €45 (eo)
(€30 se kun UEA-membreco)

Juna Amiko = €18, por infanoj (eo) (rete €11)

Kancerkliniko = €27,50 (eo)

Kontakto = €25,-, komencantoj (eo)

Literatura Foiro = €56,- (eo)

Ĝenerale / Allerlei

Pagante bonvolu klare indiki la kategoriojn +
"E3000" / Gelieve bij betaling duidelijk de
categorieën + "E3000" aan te geven.

IBAN: BE31 4025 5105 3155 de/ van
Vlaamse Esperantobond vzw, Lange
Beeldekensstraat 169, 2060 Antwerpen

Pri tekstoj nur la sendintoj respondecas / Voor
teksten zijn alleen de inzenders verantwoordelijk

De la redakcio

Jen la lasta numero el longa serio.

La nova estraro decidis uzi la eblecojn de la virtuala mondo por anstataŭi nian informleteron. Legu pri tio en la dorsflanko.

Pro tio ekde nun ĉiu membro jes ricevos la flandran revuon Horizon-Taal, en kiu ekzemple vi ankaŭ ĵus trovis la membriĝilon por 2023.

La apartan informleteron de Esperanto 3000 vi ekde nun vane atendos.

Ne konsideru tion perdo, sed nur transiro al nova mondo kun novaj kutimoj kaj eblecoj.

Esperanto plu aktivos, ankaŭ en Leuven!

La redakcio.

Kunlaboris, alfabete:

Myriam Van der Steen, Lode Van de Velde,
Yves Nevelsteen, Marc Vanden Bempt
(redakcio, sendado)

Vorteto de la nova estraro - sinprezento

Esperanto 3000 ekde majo 2022 havas novan estraron, kiu konsistas el la jenaj membroj, kiuj jam de multaj jaroj agadas en Esperantujo:

- Prezidanto: Myriam Van der Steen, fondinto de la konsila entrepreno "chezKONSILO"
- Sekretario: Grietje Symoens, kasisto de BAFE
- Kontisto kaj retejestro: Lode Van de Velde, fondinto de "Eldonejo Libera"

Ĉefhelpanto (ekster la estraro): Yves Nevelsteen, iniciatinto de Komputeko, Fonduso Instigo, motoro malantaŭ Eventa Servo.

La (nova) estraro



Nia revuo "Esperanto 3000"

Vi havas en la manoj la lastan numeron de la revuo Esperanto 3000. Tra 43 jaroj ĝi plenumis sian rolon: ĝi ligis la gemembrojn al la asocio, sciigis pri gravaj kaj malpli gravaj informoj el Esperantujo kaj precipe ĝi anoncis la aktivecojn de la samnoma asocio Esperanto 3000.

En la 3a de majo 1979 kreiĝis la asocio "Esperanto 2000", kiu en aprilo 1985 iĝis jura persono en la formo de asocio sen profitdona celo kaj en 1999 ŝanĝis sian nomon al Esperanto 3000.

Nia revuo fakte sekvis la saman evoluon. La nula numero aperis tuj post la fondiĝo, ĝi anoncis ne nur la Antverpenan UK'n (1982) sed ankaŭ informvesperon en Loveno pri Esperanto en la 11-a kaj Esperanto-kurson ekde la 18-a de oktobro 1979.



verschijnt zes maal per jaar.
aperas sesfoje en la jaro

n-ro 0, 1979/80

La revuo tiam sekvis la lernejan jaron – ne mirinde en universitata urbo, des pli ĉar pli ol la duono de la estraro estis ankoraŭ studentoj. Aldona numero fine de 1986 signis la transiron al kalendara jaro ekde 1987. La unua numero kun nomo "Esperanto 3000" estis tiu de majo 1999, la tria numero de tiu jaro.

Tra la jaroj pluraj homoj redaktis la revuon kaj/aŭ grave kontribuis en ĝin. Ni menciuj nur la plej aktivajn: Jean-Pierre Fertinel, Herman Van Eyndt, Marc Vanden Bempt, Luc Rijnders, Carl Deseure, Felix Neefs, Roger Goris, Myriam Van der Steen, sed ankaŭ multaj aliaj kontribuis.

Konstantaj rubriko en la komencaj jaroj estis "Ĉu vi sciis ke", kiu kelkfoje serioze sed ofte ankaŭ iom ŝerce listigis etajn faktojn kaj fantaziojn. Aperis ankaŭ regule unu literatura paĝo, komence daŭriga rakonto sed poste unupaĝaj rakontetoj.

../.. (daŭrigo dekstre)

(daŭrigo de maldekstre) ../..

La plej grava rolo de la revuo tamen ĉiam estis la anoncado de la programo de la asocio.

Tiel ĉiumonate okazis prelegvespero, kiu intertempe ricevis la nomon de "Vespero 3000" kaj kiu krome enhavis parolatan ĵurnalon. Ankaŭ la ĉiujara informvespero kaj Esperantokurso(j) tiel atingis parton de sia publiko – ili evidente estis anoncitaj ankaŭ en la ĝenerala loka kaj malpli loka gazetaro kaj per flugfolioj en lokaj ejoj.

En 1980 la asocio kuraĝe ĵetis sin en la organizadon de la Internacian Junularan Kongreson de TEJO, sukcese okazinta en 1982. Ekde 1979 ĝi en multaj jaroj organizis la landan feston por la Semajno de Internacia Amikeco. Poste aldoniĝis la Lingva Festivalo kiu ankoraŭ poste transformiĝis en HungaroMania kune organizata kun la hungara komunumo en Loveno/Belgio. En ĉiuj tiuj aranĝoj ankaŭ nia revuo ludis rolon, por anonci ĝin kaj por poste raporti pri ĝi.

Tiuj atestaĵoj nun konserviĝas en du ok centimetre dikaj skatoloj, konservataj interalie en la Internacia Esperanto-Arkivo (iespa.eu). Ili arkive konservas la pasinton de Esperanto 3000 por la estonto. Ekde nun la anoncandan rolon transprenos aliaj iloj, precipe elektronikaj. Ni esperu ke ankaŭ la arkiva rolo iel estos daŭrigata, malgraŭ la fakto ke la elektronika mondo ne aŭtomate tion faras.

Marc Vanden Bempt

Komunikado en la estonto

Paperaj revuoj estas belaj, sed plej multaj bedaŭrinde rapide finiĝas en rubujo. Krome, lastminutaj ŝanĝoj al kunvenoj aŭ eventoj ne plu povos aperi en la revuo, se ili jam kuŝas en via leterkesto aŭ sur via tablo.

Ĉiuokaze, ni jam sendadas ĉiujn informojn pri kunvenoj kaj ŝanĝoj al vi per retpoŝto. Krome, ili ankaŭ ĉiam konsulteblos en nia retejo (esperanto3000.be) kaj per Eventa Servo (https://eventaservo.org/o/EO_3000).

Tiusence, en la nuna cifereca epoko, la revuo do fariĝis plejparte superflua.

Per tiu ĉi lasta numero, la nova estraro deziras danki kaj gratuli la pionirojn kaj multjarajn aktivulojn pro la bona grundo kiun ili prilaboris por la daŭrigo de la agado en la estonton.

Ĉu Esperantujo kreskas aŭ malkreskas?

kaj la neceso de asocioj

La mondo draste ŝanĝiĝis pro la kronviruso, ankaŭ Esperantujo. Tio tamen donas al nia movado novajn ŝancojn, kondiĉe ke ni adaptas nin, kaj lernas “kiel funkcias nia nuntempa socio”. Multaj homoj iom perdis esperon, ĉar malkreskadas la kluba agado. Reale tamen kreskas la nombro de parolantoj de Esperanto, la kvalito de la lingvouzo kaj ankaŭ la nombro de kunvenoj en la tuta mondo - ne nur la retaj! Eblas eĉ pruvi tion, ekzemple per la Internacia Kalendaro de Eventa Servo <https://eventaservo.org/kalendaro> - kaj per <https://eventaservo.org/Eŭropo/Belgio>; vidu kiom da kunvenoj estas planitaj!

Esperantistoj en 2022 ofte ne plu aliĝas al asocioj, nek abonas revuojn. Novaĵojn oni amase kaj senprobleme trovas rete, librojn oni legas per poŝlegilo en komputilo - ekzistas granda kolekto de senpagaj libroj kaj tiel plu. Al kelkaj homoj tio povas doni impreson de malkresko de la movado. Tamen, reale estas la malo: mi volas emfazi ke Esperantujo kreskas kaj viglas.

Sen asocioj - kaj sen iom da mono - ni esperantistoj tamen ne povas agi efike. Konkrete ni bezonas asociojn kiel **Esperanto 3000**, **FEL** kaj **UEA**. Sen oficialaj delonge ekzistantaj asocioj kiel FEL kaj UEA, Eŭropo ne donacus monon por realigi projektojn kiel ekzemple Erasmus+, ne okazus grandaj kongresoj kiel la Beneluxa Kongreso kaj tiel plu. Malmultaj homoj konscias pri tiaj aferoj.

Tial jen nia alvoko: se vi volas antaŭenigi Esperanton en nia regiono, aliĝu al niaj asocioj, abonu niajn revuojn, kaj finance subtenu niajn agantojn.

Aliĝi al UEA povas esti aparte interesa, ĉar vi senpage ricevos la bitversion de Revuo Esperanto, kaj rabaton por la UK en Torino. Cetere: se vi rapide aliĝas, tio permesos al vi havi senpagan aliron al la spektakloj de la ĵus pasinta Virtuala Kongreso (ĝis 31/12).

Se vi volas subteni retajn agantojn (kaj mian personan beneluxan agadon), tio eblas per Fonduso Instigo <https://instigo.be>.

2022 estis tre sukcesa jaro por Esperanto en Belgio. Fotojn kaj filmetojn kiuj “montras tion” vi trovos en la nova Beneluxa Bitarkivo <https://benelukso.eu/bitarkivo>.

Aparte sukcesa estis nia ĉi-jara Beneluxa Kongreso en Ipro. Ĉu vi sciis, ke en ĝia kongresa retejo <https://benelukso.eu/kongreso> aperas komuna fotaro, filmetoj, la dokumentoj kiujn Piet disdonis dum la kongreso ktp? Esploru tiun paĝon kaj postĝuu. Cetere: ankaŭ pri la Beneluxa Kongreso en 2021 ekzistas tia arkiva paĝaro, vidu <https://benelukso.eu/bk2021/>

Pri 2023 eblas jam antaŭĝoji. Ni varme rekomendas al vi partopreni en la Internacia Fervoĵista Esperanto-Kongreso en Antverpeno <https://ifef2023.net>. Konsideru aliĝi al la Belga Amikaro de Fervoĵistoj Esperantistaj (BAFE), tiam vi ricevos rabaton. Pluraj aliaj eventoj estas planitaj en nia regiono: PEKO, la Studosemajnfinoj en Nederlando (dufoje jare ĝi okazas), nova Beneluxa Kongreso kaj Interkluba Semajnfino. Entuziasmo kaj planoj absolute ne mankas!

Yves Nevelsteen

Notu jam en via agendo

18 januaro 2023 – Prelego: Iloj kiuj faciligas la vivon (19:00 – 21:00)

Yves kaj Lode jam dum multaj jaroj aktivis en la Esperanto-movado kaj uzas diversajn ciferecajn ilojn por sia agado. Hodiaŭ ili montras la ilojn kiujn ili kvazaŭ ĉiutage uzas por sia agado. Eble ili povus esti utilaj ankaŭ por vi?

15 februaro 2023 – Ludo “La Granda Vojaĝo” (19:00 – 21:00)

Ni kune ludos la societatan tabulludon “La Granda Vojaĝo”, kreitan de Lode. La celo de la ludo: kiel la unua prelegi en 5 eŭropaj urboj. SED: diversaj okazaĵoj povas helpi, aŭ ĝuste malhelpi vin. Ni promesas ke estos streĉa vespero!

** Bonvenas ankaŭ komencantoj! **





Programma Esperanto 3000 vzw

Let wel: **Maakleerplek**, salono BOR 2a, Stapelhuisstraat 13 - 15, 3000 Leuven (aan de Vaart, parking Vaartkom naast OPEK)

Het Vespero3000-programma begint om 19 u., welkom vanaf 18.45 u.

| | | |
|-----------------|-----------------|-----------------|
| <p>18.45 u.</p> | <p>19.00 u.</p> | <p>19.15 u.</p> |
| <p>19.30 u.</p> | <p>19.45 u.</p> | <p>20.00 u.</p> |
| <p>20.15 u.</p> | <p>20.30 u.</p> | <p>20.45 u.</p> |